FREŜA VENTO №6.

LATVIO BET ★ 57 Ĵaŭdo, la 20-a de julio

La PROGRAMO de la 57-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj:

VENDREDO, 21.07.

9.00 – 10.00	Matenmanĝo				Studenta hotelo, 1-a etaĝo
10.00 – 11.00	Somera Universitato	**Margarita Želve**	Latvio	Livoj, liva literature kaj Esperanto	BET-ejo, 125 ejo
11.00 – 12. 00		**Nina Pietuchowska**	Pollando	Bjalistoko en la 19-a jarcento	BET-ejo, 125 ejo
12.00 – 13.00		**Samuel Adebowale**	Hispanio	Roso aŭ pluvo – kion mi povas fari por subteni ĉi tiun Esperanto-arbon	BET-ejo, 125 ejo
13.00 – 14.00	Tagmanĝo				Studenta hotelo, 1-a etaĝo
15.00 – 16.00	Somera Universitato	**Mikaelo Lineckij**	Israelo	Reklamado de Esperato	BET-ejo, 125 ejo
16.00 – 17.00		**Ulrich Mathias**	Germanio	Esperanto kaj interhomaj rilatoj (III)	BET-ejo, 125 ejo
19.00 – 22.00	Fermo kaj Adiaŭa Vespero				Ĉemara liberaera muzeo (strato Riņķa 2)

Sonas kantoj vespere

Ĉiuvespere je la 10 okazas komuna kantado, sperte gvidata de Sergej Straŝnenko kaj Mikaelo Lineckij. Kolektiĝas inter dek kaj dudek kantistoj, kiuj elektas laŭvice kantojn en Esperanto kaj en siaj propraj denaskaj lingvoj. Ĉiuj partoprenantoj kunkantas laŭ emo kaj kapablo ofte ĝis noktomezo aŭ pli poste. Ĉiuj estas bonvenaj aliĝi kaj kunkanti!

David Dichelle (Germanio)

Tago ĉe la maro

Hodiaŭ ene de la programo de BET-57 ni ekskursis tra livo-lando. Estis interese subite renkontiĝi nin ene de sekreta stacio soveta por kapti la mesaĝojn de la oponanto okcidenta dum la periodo, kiam la potencoj konkurencis. Ni vidis aparatojn, antenojn, ni trapasis la tunelon, per kiu la kabloj elektraj estis ĝis la stacio.

Daŭrigante poste ni eksciis pri la liva popolo, ĝia lingvo, manĝoj kaj teritorio. Ankaŭ ni ĝuis manĝon, kiu estis la kutima manĝo por laboristoj, kaj nun ĝenerala por ĉiuj ili kaj ankaŭ por vizitantoj. Ni manĝis sub tendo, sentante nin veraj livoj.

La ekskurso montris al ni malnovan lumturon, kiu montris al maristoj dum la pasinta jarcento kie komencis la tero kaj eviti kolisiojn kaj akcidentojn. Ni ĝuis la pejzaĝon, la maron kaj arbarojn laŭlonge de la marbordo.

Entute ni havis montron kiel vivis la homoj dum pasintaj tempoj kaj ĝuis naturon kaj amikecon, kiu ebligas nia kara lingvo Esperanto kaj personoj kiuj ĝuas ĝin.

Paulo Meliz Irache (Hispanio)
20. 07. 2023.

Liva marbordo

La unuaj loĝantoj de Latvia teritorio estis livoj – la finn-ugra popolo. Nuntempe en Latvio loĝantaj proksimume 170 livoj similas al arboj ĉe ilia marbordo: la ŝtormoj kaj ondoj ilin faligas, sed iliaj radikoj estas fortaj kaj kreskigas novajn verdaĵojn kiuj strebas al la suno.

En vilaĝo Irbene situas Centro pri Radio Astronomio de Ventspils Universitato. Esperantistoj „konkeras” pinton de la malnova antena telero.

ESPERANTISTOJ EKSKURSAS

En Liva Popola domo en Mazirbe kaj domo de Liva kulturo en Kolka, kie kolektiĝas homoj por renkontiĝoj, oni kolektas kaj konservas atestojn pri liva historio kaj tradicioj.

Kiel informcentroj pri la ŝipveturado funkcias lumturoj en Ovīši, Mazirbe, Kolka kaj aliaj.

Kolka kabo. Ni povas nur imagi, kiel varias ĝia formo depende de ŝtormo.

Līga Siliņa (Latvio)

Fotoj: Māra Timermane
Genovefa Tamane

Estimataj BETanoj! Reehu! Kunlaboru! Verku! Ni atendas viajn artikolojn, poezion ktp.

La numeron preparis: Organiza komitato de BET-57, kompilis Genovefa Tamane.